

Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo ĵaŭdon la 25an de septembro 2008 per Skype.

(Aprobata la 23an de oktobro 2008.)

Partoprenis:

Jardar E. Abrahamsen (JEA, en Trondheim),
Eli Fitjar (EF, en Töreboda),
Ulf Lunde (UL, en Os),
Anne Karin Bondhus (AKB, en Stavanger),
Asbjørn Lindh (AL, en Oslo),
Ingebjørg Rambjør (IR, en Bergen).

0. Tagordo

Aprobata.

1. Aprobo de la protokolo de la 28a de aŭgusto

Aprobata.

2. Investoj

Niaj investoj en akcia fonduso multe malkreskis dum la lasta monato.

Sed NEL ja havas ankaŭ aliajn monrimedojn: Ni havas monon en bankkonto, NEL transprenis la kason de la malfondita Eldonejo Esperanto, kaj Oslo E-klubo ŝuldas al ni proksimume 35 000 kr (post i.a. la tubista laboro en la klubeja domo).

Ĉar do nur proksimume unu triono de nia mono estas investita en akciaj fondusoj, la Estraro ne rekomendas vendi tion nun. La kasisto kaj la cetera estraro daŭre havu dialogon pri la aktuala situacio.

3. Jarkalkulo kaj jarraporto

Ni finis la jarraporton kaj la jarkalkulon 2007 retroŝte.

Ili aperis en Norvega Esperantisto n-ro 4/08.

4. Seminario

- a) La ejo Linlab en la universitato estas rezervita por la seminario. Se tie sufiĉos loko por ĉiuj partoprenantoj, la kotizo estos 150 kr. Se ne, povos esti necese trovi alian ejon, supozeble pli multekostan.
- b) Programo (enhavo kaj horoj) kaj finfina kotizo aperos ĉi tie:
<http://www.esperanto.no/nel/sem/sem2008/>

5. LK2009

La bergena klubo planas aranĝi Landan Kongreson en Os en 2009, plej verŝajne la 12an - 13an de junio.

Ni ĵus ricevis negativan respondon de la plej aktuala kongresejo en Os (Kongshaug). La aliajn alternativojn pri komuna loĝejo kaj kongresejo (Bjørnefjorden gjestetun, Solstrand Fjord Hotel) la bergena klubo taksas tro multekostaj.

Kunvenejoj kaj festenejoj abundas, la problemoj estas nur tranoktado en Os. En la komunumo Os ne ekzistas tendumejoj aŭ kabanaj parkoj. La estraro do taskigis al UL serĉi aliajn tranoktad-eblecojn en Os, privatajn aŭ publikajn, tiel ke ni povos aranĝi la LK ofertante diversnivelajn tranokteblecojn en disaj lokoj, sed en akceptebla distanco de la elektota kunveno. La bergena klubo esperas povi oferti privatan transporton en Os al ĉiuj kongresanoj.

6. Telefono en Esperantonia

Fortel ne plu ofertas larĝbendan telefonadon. Telio ofertas transpreni la abonon.

NEL havas interretan konekton per la firmao Get, sed pro historiaj kialoj nia abono formale estas en la nomo de persono. Jardar demandis al Get ĉu organizo povas formale esti ilia kliento, kaj ĉu organizo povas aboni ĉe ili telefonon. Respondoj ankoraŭ ne venis, sed se pozitivaj, tiu solvo kostus malpli ol telefonabono ĉe Telio.

7. Eventualajoj

a) UL raportis, ke li havis sonĝon pri Esperantokurso sur la kartonaj laktuoj de Tine. Eble NEL serĉu iun, kiu povos verki proponon pri (unu-du partoj de) tia kurso kaj sendi ĝin al Tine por vidi, kiel ili respondos?

Ni decidis nur pripensi la aferon; verŝajne neniu havas tempon kaj kapablon verki tion nun.

b) Douglas Draper membriĝis en la ĵurnalista asocio de TEĴA kiel redaktoro de Norvega Esperantisto. Ĉu NEL pagu la membrotizo por li dum li estas redaktoro?

Ni decidis prokrasti la decidon ĝis kiam la asocio decidus pri sia kotizo por membreco. Nuntempe ĝi estas senpaga, laŭ ilia retpaĝoj.

La interkonsiliĝo daŭris de 1930h ĝis 2142h.

La venonta interkonsiliĝo okazos je la 23a de oktobro.

Raportis Ulf Lunde, sekr.